# Biografieto

| | |
|---|---|
| 1883 | Richard Gerstl naskiĝas en Vieno. |
| 1894-1901 | Elementa lernejo, gimnazio. |
| 1897 | Desegnada instruado. |
| 1898 | La Akademio por Figura Arto en Vieno akceptas Gerstl post ekzameno. |
| 1900-1901 | Someraj restadoj en Nagybánya, kie aktivas pentrista kolonio. |
| ekde 1901 | Gerstl loĝas en la 19a distrikto de Vieno, kie li disponas pri ateliero. Li interesiĝas pri la verkaro de Sigmund Freud kaj eklernas la italan kaj hispanan lingvojn. |
| 1903 | Gerstl vizitas la 16an ekspozicion de la Viena Secesio, kie montriĝas pentraĵoj de Manet, Munch kaj Hodler. |
| 1906 | Heinrich Lefler instigas Gerstl al memstara laboro. Li disponigas al Gerstl propran atelieron. |
| 1906 | Gerstl konatiĝas kun la komponisto Arnold Schönberg kaj ties edzino Mathilde. Gerstl portretas multajn personojn el la amikaro de Schönberg. |
| 1908 | Gerstl ne sukcesas ekspozicii siajn verkojn. |
| 1908 | Arnold Schönberg malkovras la amrilaton inter Mathilde kaj Gerstl. Sed baldaŭ Mathilde revenas al sia edzo. |
| 1908 | Gerstl pentras sian lastan „memportreton kiel nudaĵo”. La 4an de novembro Gerstl memmortigas sin, eble pro depresio aŭ pro amdoloro. La verkoj de Gerstl estas konservitaj en kestoj. Ili restas dum 23 jaroj en la ejoj de spedicio. |

Robert Musil

Diferenco estas: Ne la geniulo antaŭas sian tempon je cent jaroj, sed la ordinara homo malantaŭas sian tempon je cent jaroj.

# Otto Kallir savis la verkaron

**Otto Kallir** estas la savinto de la verkaro de Gerstl. Alois Gerstl, la frato de Richard Gerstl, vizitis en la jaro 1931 Otto Kallir kaj montris al li bildojn de Richard Gerstl, kiuj estis polvokovritaj, malpuraj, disŝiritaj, do en tre malbona stato. Kallir konstatis la unikan valoron de la pentraĵoj kaj faris provizoran katalogon. Tiutempe ne eblis dati la bildojn, ĉar jarindikoj mankis preskaŭ ĉie.

1931-1935 Kallir organizis ekspoziciojn de verkoj de Gerstl en Vieno, Munkeno, Berlino, Kolonjo, Aĥeno kaj Salcburgo.

Ĉiu verko de Gerstl estas memstara objekto. Ne ekzistas kontinua evoluo de lia stilo. La pentraĵoj estas realismaj, ekspresionismaj, punktismaj, abstraktaj. Ankaŭ la karaktero de Gerstl estis multfaceta: Nestabila, nervoza, suferanta je stomakdoloro, hezitema, dubema, inteligenta.

Kiam pro politikaj kialoj Kallir translokiĝis en la jaro 1938 al Parizo, li transdonis multajn Gerstl-verkojn al Neue Galerie en Vieno, Grünanger-gasse 1. En Parizo Kallir fondis Galerie Saint Etienne; post la translokiĝo al Usono li fondis en la jaro 1939 en Novjorko filion de tiu artgalerio – sed la pariza artgalerio tiam ne plu ekzistis.

Post la Dua Mondmilito Kallir revenis al Vieno kaj ricevis la bildojn de Gerstl. Ekde 1960 Otto Breicha intense studis la verkaron de Gerstl kaj parolis kun homoj, kiuj konis Richard Gerstl.

La novjorka artgalerio ankoraŭ ekzistas. Ĝi estas gvidata de nepino de Kallir, sinjorino Jane Kallir:  www.gseart.com

Pri la ekspozicio en Leopold-Muzeo eldoniĝis 2019 ampleksa katalogo en la germana kaj angla lingvoj.

Pliaj informoj: www.leopoldmuseum.org/de/presse/

